**N I A V O Ĉ O**
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
☎ lunde vespere (91) 530 87 98
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz JUNIO 1995

Maribel Alonso ricevos la premion "Klara Silbernik-1995" kiel pacienca edzino de Juan Carlos Ruiz Sierra, prezidanto de MEL. GRATULOJN!!!

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°**

Marde/ĵaŭde, ekde la 18,00 ĝis la 20,30 h. funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 8079

Ĉe la teraso de kafejo de Parque del Retiro dekstre, apud la enirejo "Puerta de Alcalá", okazas parolrondo la 1-an kaj 3-an merkredojn de ĉiu monato. Kutime gvidas ĝin Ana Manero.

Prelegoj dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.

19-an junio "Zamenhofaj vortoj en Boulogne-sur-Mer". F. Moral

## STANDARO PRI LINGVO INSTRUADO

Usona standara asocio (ASTM American Society for Testimg of Materials) preparas gvidilon por instruado, orientita al uzado, de eksterlandaj lingvoj. La dokumento inkludas tabelojn kun horoj bezonataj por diversaj niveloj de instruado de lingvoj kaj definas konoj por tiuj niveloj. (ASTM F1535)

NIVELOJ DE PAROLA KAPABLO

| NIVELO | PRISKRIBO |
|---|---|
| 0 | NE-KAPABLO |
| 0+ | KAPABLO DE SUPERVIVO. Kapablo plenumi bazajn bezonojn kiel loĝado, manĝado kaj transportoj, nur pere de parkeritaj frazoj. Sen flueco. |
| 1 | MINIMUMA FUNKCIA KAPABLO. Kapablo plenumi bezonojn de ĝentileco kaj teni tre simplajn konversaciojn pri kutimaĵoj. Oftas miskomprenoj. Ekzemploj: Eblas interŝanĝi salutojn, intuicie konjekti informojn kaj klarigi rutinajn demarŝojn ne amplekse. |
| 2 | LIMIGITA FUNKCIA KAPABLO. Kapablo elturniĝi ene de rutinaj ĉiutagaj interrilatoj. Kapablo por elturniĝi, fidele sed ne flue, en plimulto de sociaj konversacioj, pri temoj kiel aktualaj eventoj, laboro, familio, ktp. Ekzemploj: Eblas tipe demandi kaj respondi antaŭvideblajn demandojn ĉe laborejo, kaj ricevi kaj doni facilajn instrukciojn. |
| 3 | ĜENERALA FUNKCIA KAPABLO. Kapablo paroli la lingvon sufiĉe flue kaj korekte por partopreni efikoplene plimulton de formalaj kaj neformalaj konversacioj pri praktikaj, sociaj kaj profesiaj temoj. Tamen rimarkeblas lingvaj kaj kulturaj eraroj, kiuj limigas la personan kapablon por partopreni pli kompleksajn interrilatojn kiel altnivelaj negocoj. Eblas facile paroli pri konkretaj interesoj kaj specialaj fakaj kampoj. Ekzemploj: Eblas uzi la lingvon kiel parto de normalaj profesiaj devoj, respondante obĵetojn, klarigante punktojn, pravigante decidojn, komprenante la esencon de la temoj, eksponante kaj defendante politikajn argumentojn, gvidante kunvenojn, prelegante, ktp. Oni povas fideble atingi informojn kaj opiniojn el denaska parolanto. |
| 4 | KOMPLETA FUNKCIA KAPABLO. Kapablo por uzi la lingvon flue kaj korekte je ĉiuj niveloj de profesiaj bezonoj. Ekzemploj: Kompreno de detaloj kaj branĉigo de konceptoj kiuj estas kulture au koncepte malsamaj de siaj propaj. Starigi la nuancadon de interpersonaj, oficialaj, duonoficialaj, profesiaj kaj neprofesiaj parolaj interŝanĝoj kun ampleksa denaska parolantaro (por ĉiaj publikoj, ĉeloj, taskoj). Oni povas efike roli inter denaskaj parolantoj en kuntekstoj kiel negocadoj, prelegoj kaj debatoj, esprimante malkonsenton. Fine oni povas defendi tezon, kaj formale kaj en hazardaj okazoj, uzante kompleksajn parolajn strategiojn |
| 5 | EDUKITA DENASKA KAPABLO |

Noto: La plus-signo (+) apud la niveloj de unu ĝis kvar (tio estas 1+, 2+, 3+ kaj 4+) montras la kapablon por sukcese elturniĝi je ciuj funkcioj de tiu nivelo, kaj, ne kontentige, je kelkaj de la sekva.

HOROJ BEZONATAJ POR PROFITAJ NIVELOJ LAŬ LINGVA MALFACILECO
(Proksimumaj horoj. Realaj horoj dependas de la studenta kapableco)

| Lingvo Ekde P/K/L * -0 ĝis | P/K/L-1 | P/K/L-2 | P/K/L-3 | P/K/L-4 |
|---|---|---|---|---|
| 1a. **Lanitidaj kaj germanidaj** Franca, hispana, portulaga, itala, romania, germana, afrikaana, dana, nederlanda, noruega,sveda | 150 | 400 | 650 | ** |
| 2a. **Araba, ĉina, japana, koreana** | 350 | 1.100 | 2.200 | ** |
| 3a. **Aliaj** Orient-Europaj, afrikaj, asiaj *** | 250 | 600 | 1.100 | ** |

Noto: Por atingi tiuj-ĉi nivelojn devas aldoni minimume 2/3 horojn de studo po 5 klas-horoj.

La tabelo estas adaptita de modelo de "U.S. State Department Foreing Service Institute" por parol-kapabla niveloj de diversaj lerno-tempoj. La celo de la adapto estas necesoj de studentoj de privata sektoro.

* P=Parol-kapablo, K=Kompren-kapablo, L=Leg-kapablo

** Ĝenerale ne povas esti atingita en klaso, estas necese praktiki ĉe nativa etoso

*** Indonesia, malaja proksimune bezonas jenajn klas-horojn for P/L-1:200; P/L-2:500; P/L-3:900

## ESPERANTO EN LA HISPANA MILITO

S-ro Ulrich Lins sendis al Lucrecia San Antonio ok paĝajn artikoleton pri esperantistoj en la hispana intercivitana milito. La tekso aperis en libro eldonita de Muzeo Dortmund en 1993. Pro ĝia intereso ni sendas kopion al membroj de MEL. Aliaj povas rivevi kontraŭ 5 poŝtmarkoj po 19 PTA.

## HISPANIO

Dum la semajno pri alternativa kino prezentis novan holografian ekranon la brazila esperantisto P-ro Luzzati. Li montris en esperanto sian projekton al diversaj membroj de MEL.

## *HEF ANGULO (Ne oficiale)*

Jam en "Strategia plano-1993" de HEF aperis punkton rilate organizado/eldonado de korenponda kurso. Pro diversaj kialoj, prencipe manko da kapabl-laboruloj, ĝis nun la kurso ne estas preta. Almenaŭ unu persono semajne telefonas al HEF-CO petante informoj pri baza kurso en Madrido. Laŭ propono de la Liceo, por ne perdi tiujn interesulojn, oni organizos en Madrido korespondan kurson, simila al tiu kiu oferas en Malago. La kurso estos organiziita de Liceo kaj aŭspiciita de HEF kiu oferos sian sidejon kiel klasejo ĉar kiel komplemento al tekstoj kaj hejm-laboro, liceanoj organizos kelkajn klasojn por klarigi duboj kaj perfektigi prononcadon.

La sekretario de HEF havas en sia plano sekvi rekomendojn de "Strategia plano" kaj fari, kun helpo de taŭgaj kaj fakaj esperantistoj, novan tekston por ke HEF havu propan korespondan kurson kun sufiĉe da profesia nivelo.

**VENAS SOMERO**

Aĉetu ĉe MEL T- ĉemizojn kun verda stelo ĉirkaŭita de la vorto ESPERANTO.

Prezo: 600 PTA plus sendokosto

20% rabato por pli ol 20.

## EKSTERLANDE

**Venezuela** Fakultato de Humanismaj kaj Edukaj Studoj de la Centra Universitato organizas ne devigan kurson sed la kursanoj gajnas du kreditojn same kiel la latina kaj la greka ("Eventoj" marto 95)

**Antartida** Esperanto Asocio fondita kun 78 anoj. Esperanto atingis tiun kontinenton en 1908 pere de episkopo kiu instruis siajn novajn konvertitojn. La nova asocio havas rilatojn kun Aŭstralia Asocio. Kompreneble la eldonota revuo ne povas havi alian nomon ol "La verda pingveno"; ĝi aperos kiam asocio sukcesos akiri komputilon kapablan funkcii je -60°C ("La lampiro" nº 75)

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal